


Esperanto aktuell

259



38. Jahr (2020) №1 (259)

Informationen für Esperantofreunde in Deutschland und Österreich



Heilig-Kreuz-Kirche, la sola katolika preĝejo en la kongresurbo Frankfurt (Oder).

Deutscher Esperanto-Bund e.V. Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B

www.esperanto.de/deb (Netzpräsenz)

Bankkonto (por membrokotoj kaj donacoj) /

Bankverbindung (für Mitgliedsbeiträge

und Spenden): HELADEFIERB,

Sparkasse Odenwaldkreis,

DE 3250 8519 5200 4011 4571.

Spenden und Mitgliedsbeiträge für den

D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

Oficejo / Geschäftsstelle:

Esperanto-Laden

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

Leitung: *Sibylle Bauer*

030 / 5106 2935, 0800 336 3636

Fax: 030 / 4193 5413

sibylle.bauer@esperanto.de

Membropriizorgado / Mitgliederbetreuung

DEB: 0800 - 3 36 36 36 - 21

DEJ: 0800 - 3 36 36 36 - 22

Briefpost senden Sie bitte, soweit keine andere Anschrift angegeben, an die Geschäftsstelle. Sie wird von dort elektronisch weitergeleitet. Die angegebenen **Telefon-Durchwahlnummern** sind nach der Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu wählen.

Estraro GEA / Vorstand DEB

Netzpost an / retmesago@gea.fe@esperanto.de

Jedes Vorstandsmitglied ist individuell

erreichbar per E-Post-Adresse in der Form

vorname.name@esperanto.de.

Prezidanto / Vorsitzender

Ulrich Brandenburg, Durchwahl: -5111

gea.prezidanto@esperanto.de

Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender

Andreas Emmerich, Durchwahl: -5112

Trezoristo / Kassenwart

D-ro Matthias Hecking, Durchwahl: -5113

Sekretario / Schriftführer

Nils Brinkmann, Durchwahl: -5125

Landaj ligoj / Landesverbände

Wolfgang Bohr, Durchwahl: -5114

Administrado / Verwaltung

Barbara Brandenburg

Publika agado kaj pliklerigado /

Öffentlichkeitsarbeit und Weiterbildung

Oliver Walz, Durchwahl: -5116

Kongresoj kaj renkontigoj /

Kongresse und Treffen

Andreas Diemel, Durchwahl: -5120

Informteknologioj/Informationstechnologie

Franz Kruse, Durchwahl: -5119

Jugendvertreterin / GEJ-komisiito

Michaela Stegmaier, Durchwahl: -5118

Germana Esperanto-Junularo /

Deutsche Esperanto-Jugend

Michaela Stegmaier, Durchwahl: -5211

gej.prezidanto@esperanto.de

Komisiitoj / Beauftragte

esperanto.de/deb/beauftragte

Gazetaraj kaj publikaj aferoj

/Presse und Öffentlichkeitsarbeit

Louis von Wunsch-Rolshoven,

Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112

louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de

Komisiito por rondvojaĝoj/ Rundreisen,

Durchwahl: -5123

Uli Ender, uli.ender@esperanto.de

Erasmus+

Marianne Maurer, Durchwahl: -5126

marianne.maurer@esperanto.de

Informmaterialo/Informationsmaterial

Goar Engländer, Durchwahl: -5127

goar.englaender@esperanto.de

Medienecho

Hermann Kroppenberg, Durchwahl: -5121

medienecho@esperanto.de

Libroservo / Bücherdienst

D-ro / Dr. *Wolfgang Schwanzer*,

Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz, Durchwahl:

-5122, buchversand@esperanto.de, www.esperanto.de/buchversand

Komisiito Interreta Redaktado /

Beauftragter Internetredaktion

Thomas Bormann, Durchwahl: -5117

thomas.bormann@esperanto.de

Pliaj adresoj / Weitere Adressen

Germana Esperanto-Junularo (GEJ) /

Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412

www.esperanto.de/gej (Netzpräsenz)

Interkultura Centro Herzberg (ICH) /

Bildungszentrum des D.E.B.

Komisiitoj/Beauftragte: *Zsófia Kóródy*

(instruado), *Peter Zilvar* (klerigado kaj kulturo),

Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, die

Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521) 1363,

Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax),

ich@esperanto.de, www.esperanto.de/ich

Germana Esperanto-Instituto /

Deutsches Esperanto-Institut

Prof. D-ro/Dr. *Martin Haase*, Lehrstuhl für

Romanische Sprachwissenschaft,

Uni Bamberg, Durchwahlen: -431 (Tel),

-432 (Fax), martin.haase@esperanto.de,

www.esperanto.de/dei

Germana Esperanto-Biblioteko /

Deutsche Esperanto-Bibliothek

p/a. *Karl Heinz Schaeffer*, Schulstr. 17, 73432

Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)

biblioteko@esperanto-aalen.de

bibliothek-aalen@esperanto.de

www.esperanto.de/bibliothek

Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung

Andreas Emmerich, estraro@fame-stiftung.de

(nur por FAME)

Stiftung Mondo

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,

030/6920 4846-1, stiftungmondo@gmail.com,

Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart eG,

BLZ 600 901 00.

Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

Aŭstria Esperanto-Federacio /

Österreichischer Esperanto-Verband

aef@esperanto.at, www.esperanto.at

Aŭstria Esperanto-Junularo /

Österreichische Esperanto-Jugend

Weissgerberlande 30-36/5/11, 1030 Wien,

aef@esperanto.at, <http://aef.esperanto.at>

Esperantomuzeo Vieno /

Esperantomuseum Wien

Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien,

+43/1/53410-731, Postanschrift: Österreichische

Nationalbibliothek, Josefsplatz 1, Postfach 25,

1015 Wien, plansprachen@onb.ac.at, www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm

UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundes-

beauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA

Germanio / Deutschland

D-ro / Dr. *Wolfgang Schwanzer*, Adressen siehe

mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst

Aŭstrio / Österreich

Leopold Patek, Martinstr. 104/38,

3400 Klosterneuburg, Poŝtel. +43/66473611289,

aon.913548977@aon.at

Esperanto aktuel

ISSN 0942-024 X

Eldonisto / Herausgeber

Deutscher Esperanto-Bund e.V.,

der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

Redaktista teamo / Redaktion:

Stano Marček (Martin/Slovakio),

Yashovardhan Singh, Im Johannistal 23, 42119

Wuppertal. Durchwahl: -54

Kunlaborantoj / feste Beiträger:

Hermann Kroppenberg (Medienecho),

Utho Maier (Bibliothek), Peter Zilvar (ICH)

Presejo / Druck

Alfaprint, Martin, Slovakio

Esperanto aktuel kun *-kune* havas ses

numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo

(vidu maldekstre supre) por 18 €

(de eksterlando: 24 €) jare.

Esperanto aktuel mit *-kune* erscheint

sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der

Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 18 €

(Ausland: 24 €) jährlich; für ordentliche

Mitglieder im Beitrag enthalten.

Anoncoj / Anzeigen:

Skribu al / Schreiben Sie an: deb@esperanto.de

Kontribuoj / Beiträge

Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato *.doc

a.s.) al ea@esperanto.de, por n-ro 2020/2 ĝis

la 15-a de marto 2020. Paperaj kontribuoj nur

esceptkaze, tiam al Yashovardhan Singh (vidu

supre). Senden Sie Ihre Beiträge bitte (im

Format *.doc o.ä.) an ea@esperanto.de,

für Nr. 2020/1 bis zum 15. Mär 2020.

Papierbeiträge nur im Ausnahmefall, dann

an Yashovardhan (s.o.).



Karaj legantoj,

la redaktofinon en januaro estas iom frua por konkludoj, sed jarŝanĝo ĉiam estas taŭga okazo por pripensi, kio bone aŭ malpli bone sukcesis en la pasinta jaro, kaj je kio ni estonte koncentru niajn klopodojn. Per nia kongreso en junio 2019 ni oficiale kontribuis al la UNESKO-jaro de indiĝenaj lingvoj, kaj sukcesis vekti iom da atento inter la defendantoj de lingvaj rajtoj. Membroj de GEA kaj la asocio mem profitis de subvencioj el la programo *Erasmus+* por pluraj renkontiĝoj en eksterlando. En decembro la fonduso por pola-germana kunlaboro decidis finance subteni la ĉi-jaran kongreson, kiun ni organizos kune kun niaj polaj gekolegoj kaj la Internacia Fervoja Esperanto-Federacio en Frankfurt (Oder) kaj Słubice. Ĉio-ĉi gravas ne nur por la financo de la asocio (kiuj en 2019 efektive finiĝis pli bone ol atendite), sed ankaŭ signifas publikan agnoskon de nia laboro. Kaj per la novelekto de estraranoj kaj komisiitoj ni sukcesis iom pli larĝigi la bazon de kunlaborantoj, de kiu la asocio dependas. Unuflanke 2019 do estis kuraĝiga jaro. Aliflanke daŭras la konataj deficiitoj je ĉiuj niveloj. Ne mankas bonaj ideoj, sed tro ofte mankas la laborfortoj por realigi ilin.

Valorus daŭrigi la kontaktojn kun la asocioj de etnaj minoritatoj en Germanio, starigitajn ĉirkaŭ la kongreso en Neumünster: ili estas naturaj aliancanoj por ni. Kiu el ni povus serioze kaj fideinde transpreni tiun taskon? Niaj gekolegoj en Pollando kaj Kroatio sukcesis listigi Esperanton ĉe UNESKO kiel parton de sia respektiva kultura heredaĵo. Ankaŭ Germanio ludis gravan rolon en la historio de la Internacia Lingvo. Ni do havus bonajn argumentojn, sed ni ankaŭ havas aparte komplikajn sistemon pro la rajtoj de la 16 federaciaj landoj. Estus tasko, al kiu necesus dediĉi sin dum pluraj jaroj. Kiu el ni povus tian projekton kunordigi (kaj ne ĉiam la samaj personoj: ni vere bezonas aldonajn laborfortojn)?

Dum nia antaŭlasta kongreso en Zweibrücken – kun la temo „Esperanto – tutmonde ligita“ – ni parolis pri la uzo de novaj komunikiloj por nia informa laboro. En tiu rilato ni fakte estas farantaj paŝon antaŭen. Ĉar preskaŭ ĉiuj membroj hodiaŭ havas retajn adresojn, ni starigis novan adresaron „aktivuloj“, por rapide distribui informojn (cetere: se vi deziras, vi povas ricevi *Esperanto aktuell* ankaŭ rete*). Ekde la lasta kunveno de la asocia konsilantaro en novembro funkcias laborgrupo pri informado, kiu celas pli efike uzi la novajn komunikilojn interne kaj eksterne, i.a. per reta novaĵletero kaj aktuala prizorgo de nia Facebook-profilo. La kunordigon de tiu grupo transprenis Franz Kruse. Jam pluraj novaj kunlaborantoj aliĝis.

Regule funkcias niaj tradiciaj renkontiĝoj. Printempa Semajno Internacia (PSI; ĉi-jare en Wittenberg, eblas ankoraŭ aliĝi!) trovis firman lokon inter la renkontiĝoj por la meza generacio kaj familioj kun infanoj, kaj ĝi ne plu estas deficitata. Multe da laŭdoj mi aŭdis pri la ĵus pasinta jarfina renkontiĝo en Nördlingen: Luminesk' sukcesis transpreni la rolon de Internacia Festivalo, kiun dum multaj jaroj organizis Hans-Dieter Platz. Kaj en oktobro 2020 sub gvido de Gerald Roemer ni reprenos la tradicion de komuna aŭtuna migrado (EMA). La ĝis nun lasta okazis en 2016, la nuna estas planita por oktobro ĉirkaŭ Hitzacker en Wendland. Ĉu ni foruzas tro da energio por renkontiĝoj? Eble, sed ankaŭ en la reta aĝo la Esperanto-komunumo bezonas lokojn por kunveni, praktiki la lingvon kaj kontakti.

Granda renkontiĝo kaj aparta organiza defio fariĝos la jam menciita komuna kongreso ambaŭflanke de la rivero Oder. Post kelkaj tagoj okazos surloke preparkunveno kun la aliaj du asocioj, post tio devos baldaŭ aperi la dua informilo kun pliaj detaloj. Ĝojiga novaĵo estas, ke al la kongreso ankaŭ aliĝis Eŭropa Esperanto-Unio (kiu tie organizos sian asembleon), kaj ke kadre de la kongreso okazos serio da sciencaj prelegoj, organizitaj de AIS. Ankaŭ ekster Germanio kaj Pollando la intereso jam estas granda.

Por ne soni tro pozitive, jen ankoraŭ unu el niaj deficiitoj: la nombro de membroj malkreskas malrapide, sed konstante. Nia aĝostrukturo estas konata: tiu fenomeno, je kiu suferas multaj asocioj, do ne surprizas. Nove aliĝas al GEA mezume unu persono monate. Jam se ni sukcesus duobligi tiun nombron, ekzemple per pli efika varbado, ni povus stabiligi la asocion. Inter niaj multaj taskoj tiu verŝajne estas la plej elementa!

Sukcesan novan jaron 2020 deziras

Ulrich Brandenburg

Enhavtabelo/Inhalt

1: Heilig-Kreuz-Kirche, la sola katolika preĝejo en la kongresurbo Frankfurt (Oder).

2: Adresoj

3: Germana Esperanto-Asocio:

Karaj legantoj! Enhavtabelo.

4-5: Interkultura Centro Herzberg:

DEUTSCHE WELLE in Russland filmte in Herzberg. Weihnachts- und Zamenhoffeier mit Höhepunkten. Kuraĝa alvoko!

6-7: Germana Esperanto-Asocio:

Novajoj pri nia kongreso en Frankfurt (Oder) kaj Słubice. Mitgliederversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes am 31. Mai 2020 in Słubice. D.E.B.-Haushaltsplan 2021. Al la aktivuloj de Germana Esperanto-Asocio.

8-9: Aŭstria Esperanto-Federacio:

Cetere okazis: 2019-12-14: Vernisaĝo

"Akvo de la mondo" en Vieno. 2019-12-14: Zamenhoffesto en Vieno.

2019-09-18: Esperantomuzeo Vieno gvidis packomitatojn. 90 jaroj de Esperantomuzeo de Aŭstria Nacia Biblioteko kaj internacia scienca simpozio pri planlingvoj kaj lingvoplanado.

10-13: El la lokaj grupoj: Kolonia Esperanto-Grupo festis Antaŭkristnaskan kaj Zamenhof-Vesperon en Bensberg. Erfahrungen der Esperanto Gruppe Duisburg. Zamenhoffesto 2019 en Berlino. Zamenhof-Fest der Esperanto-Gruppe Bamberg. Vinetikedo. FEB invitis germanan esperantiston al prelegvojaĝo.

14-15: Medienecho. Vojaĝo tra Eŭropo.

16-17: El bibliotekoj kaj arkivoj:

Folge 51 – Kurze Buchbesprechung einer bildungspolitischen Analyse.

18-22: Jarfinaj renkontiĝoj: La 18-a Novjara Renkontiĝo en Wiesbaden. Mia vojo en Esperantujo ĝis la 5-a Luminesk en Nördlingen. Mein Weg zu Esperanto bis Luminesk'5 in Nördlingen. 5-a Jubileeto de Luminesk'.

23-24: Kalendaro.

25-30: ~~kune~~ – revueto de Germana

Esperanto-Junularo: Junulara Esperanto-Semajno en Karlów. Protokoll zur Mitgliederversammlung der Deutschen Esperanto-Jugend (DEJ) e. V. Kassen. Kassenprüfbericht 2018. Haushaltsplan 2020 der DEJ. Baldaŭ okazos. Ehemalige Vorstandsmitglieder der DEJ erzählen über ihre Amtszeit. Sprachkurs Esperanto AEGEE & DEJ.

31: El la landaj ligoj: REVELO-Tag.

Mortis Michael Schmidt.

32: Fotoj el 18-a NoRo en Wiesbaden.

*) Rimarko de la redakcio: la reta eldono de *Esperanto aktuell* en pdf-formato estas plenkolora!

DEUTSCHE WELLE in Russland filmte in Herzberg

Die Redaktion der *Deutschen Welle* in Moskau sandte die Journalistin Anna Savchuk nach Herzberg, um hier Nachforschungen zum Thema Esperanto und Dr. L. L. Zamenhof anzustellen.



Der Erfinder der neutralen internationalen Sprache Esperanto Dr. L.L. Zamenhof wurde am 15.12.1859 in Bialistok geboren. Diese Stadt (heute in Ostpolen) gehörte damals zum Zarenreich Russland.

Anlässlich des 150. Geburtstages dieses Mannes, nämlich am 15.12.2009, wurde in der Esperanto-Stadt Herzberg am Harz das Zamenhof-Denkmal eingeweiht.

Der 160. Geburtstag (15.12.2019) dieses weltbekannten Sprachschöpfers war ein wichtiger Grund für die Deutsche Welle um hier "vor Ort" Nachforschungen anzustellen. So trafen sich am 15. Dezember beim Zamenhof-Denkmal auch Esperanto-Sprecher aus Herzberg.

Die junge Journalistin filmte und fotografierte in Herzberg u.a. das Schloss, den Juessee mit mehrsprachigen Baumbeschilderungen, den Zamenhof-Platz mit dem

Zamenhof-Denkmal, viele zweisprachige Schilder, das Esperanto-Centro mit großen Büchersammlungen, usw. Sie besuchte auch die aktuelle Esperanto-Sonderausstellung im Museum des Herzberger Welfenschlosses. Viele Fragen mussten im Esperanto-Centro beantwortet werden.

U.a. wurden der Herzberger Bürgermeister Lutz Peters, Dr. Anina Stecay, Zsafia Korody, Michaela Stegmaier, Peter Zilvar und einige Seminarteilnehmer interviewt.

Es soll bald durch die Deutsche Welle in Moskau ein umfassender Fernsehbericht über Herzberg am Harz - die Esperanto-Stadt in deutscher Sprache ausgestrahlt werden.

Sobald wir den Termin für die Ausstrahlung erfahren werden, wird das gern im HARZKURIER veröffentlicht.

Den Film (in russischer Sprache) gibt es bei youtube:

www.youtube.com/watch?v=nsxrYIOirUg **Peter Zilvar**

Weihnachts- und Zamenhoffeier mit Höhepunkten



Die Esperanto-Gesellschaft Südharz mit Sitz in Herzberg veranstaltete diese Traditionsfeier im "Freiheitler Hof" in Osterode.

Der Vorsitzende Peter Zilvar berichtete über ein erfolgreiches Vereinsjahr. Besonders erfreulich ist, dass auch einige Schülerinnen und Schüler nachwachsen, welche diese neutrale Brückensprache für internationale Kontakte geschickt anwenden. Es wurde von den Herzberger Jugendlichen ein selbst gebastelter Weihnachtsgruß für den Esperanto-Klub in der Partnerstadt Góra gefertigt.

Es wurden Informationen und kleine Weihnachtsgeschenke ausgetauscht. Weihnachtslieder, die von dem Herzber-



ger Esperanto-Pionier Joachim Gießner ins Esperanto übersetzt wurden, sind besonders beliebt. Dieser Sprach- und Kulturverein befindet sich bereits im vierundvierzigsten Vereinsjahr.

Der Vorsitzende konnte vier besonders aktive Esperanto-Freunde auszeichnen. Erika Weigmann aus Herzberg erhielt für eine langjährige aktive Klubbeteiligung den kunstvollen Wanderpreis "Ora Madono" (Goldene Madonna).

Ferner bekam Zsafia Korody die Herzberger Künstlermedaille für eine kontinuierliche vielseitige Kultur- und Unterrichtstätigkeit. So ist beispielsweise eine der größten esperantosprachigen Bibliotheken mit vielen Spezialsammlungen in der Esperanto-Stadt Herzberg entstanden.

Weiterhin wurde das Nachwuchstalente Dr. Anina Stecay für hervorragende fachliche Bildungsarbeit beim Esperanto-Zentrum mit einer Herzberger Medaille geehrt.

Michaela Stegmaier, welche die Vorsitzende der Deutschen Esperanto-Jugend ist, erhielt für ihre aktive Jugend- und Pfadfinderarbeit ebenfalls eine wertvolle Bronzemedaille des Dresdner Medailleurs Peter Götz Güttler.

Peter Zilvar

Anlage:

Foto 1) Michaela Stegmaier (Vorsitzende der Deutschen Esperanto-Jugend) aus Herzberg mit Weihnachtskarten (die sie mit Jugendlichen selbst gestaltet haben) und u.a. für die Partnerstadt Góra bestimmt sind.

Foto 2) Erika Weigmann (aus Herzberg) erhielt den Vereinspreis „Ora Madono“.

Kuraĝa alvoko!

Kunkreantoj kaj kunlaborantoj serĉataj!

Ni, kunlaborantoj kaj klubanoj de la Esperanto-Centro, strebas de multaj jaroj por krei eksterordinaran publikan Esperanto-infrastrukturon en Herzberg am Harz. Ni estas tre dankemaj al la urbo kaj al ĉiuj kunagantoj, kiuj helpis, helpas en tiu laboro, kaj ne nur ekestas sed daŭre vivas en „Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo“. Tio donas videblajn kaj unikajn modelojn por la Esperanto-movado en la publiko.

Multaj homoj, gastoj, ĵurnalistoj, politikistoj, ktp. rimarkas, ke la internacia lingvo Esperanto vivas kaj kulture agadas. Konstante ĝi pozitive elradias. La plej multaj homoj en nia regiono scias, kio Esperanto estas kaj la plej multaj havas almenaŭ pozitivan opinion pri la granda Zamenhofa invento.

Homoj vizitas la muzeon en la bela Welf-kastelo. Jam ni organizis la 15-an fakekspozicion kunlige al Esperanto. Certe jam multaj dekmiloj ricevis informon pri la ekzisto de la lingvo kaj kunportis informilojn rilate al Esperanto. Aparte multaj eksterlandaj gastoj venas el Danlando, Nederlando kaj Belgio al nia urbo kaj kutime vizitas la muzeon.

En la urbo ekzistas diversaj rondvojoj kun Esperanto-informoj aŭ tekstresumoj, ekz. la promenvojo „Akvo-8“, la „Benko-Vojo“ kun multaj sidbenkoj en belaj lokoj dise en

la urbo, la Animpado apud la hospitalo, la promenvojo kun multaj arbospecioj ĉirkaŭ la bela Jues-lago. Krome ni eldonis dulingvajn faldfoliojn, kiuj estas haveblaj ekz. en la muzeo, turisma oficejo, ktp.

Multe pli ol cent turismaj vojmontriloj estas dulingvaj, ekz. Esperanto-Centro, Policejo, Juĝejo, Financoficejo, Centra Busstacio, Lonau-Akvofalo, Jues-Lago, Rulskeeto, Urba Biblioteko, Stacidomo, Kastela Stacidomo, Welf-Kastelo, Urbodomo, ktp. Evidente ĉie ajn oni povas tion okulfrape vidi.

Multaj fruktaroj (ĉerizujoj, pirujoj, pomujoj) en Juesholz-Strato havas ŝildetojn tute en Esperanto.

En la urba biblioteko troviĝas aparta bretaro kun ĉ. trimil esperantlingvaj libroj. Dum la malfermtempoj de la urba biblioteko oni povas viziti tion.

La Esperanto-Placo kun la konata Gießner-Memorejo kaj memorŝtono (tuj antaŭ la stacidomo) allogas multajn homojn. Cetere la strato inter la stacidomo kaj la Esperanto-Placo havas la nomon laŭ la Esperanto-pioniro „Joachim-Gießner-Vojo“.

La Zamenhof-Placo kun la bela Zamenhof-Monumento kaj kun la konstanta granda Esperanto-Flago estas okulfrapa. Ĉiutage multaj homoj fotas la Zamenhof-Monumenton. Tie troviĝas unika bonvenigtabulo en pli ol kvindek lingvoj.

En la najbara vilaĝo Sieber ekzistas la „Ponto de la Espero“ kun memorŝtono kaj teksto en tri lingvoj. Ĉe la Boule-Ludejo la ludreguloj estas kaj en la germana kaj en Esperanto.



Novaĵoj pri nia kongreso en Frankfurt (Oder) kaj Słubice

La 18-an de januaro en Słubice kunvenis reprezentantoj de GEA, PEA kaj IFEF por interkonsenti pri pliaj detaloj rilate al la komuna kongreso (29-a de majo ĝis 1-a de junio 2020 kun daŭriga fervojista programo ĝis la 4-a de junio).

Gis la fino de 2019 – do en la unua kategorio – al la komuna kongreso jam aliĝis entute ĉ. 130 partoprenantoj: fariĝos do ne nur nekutima (tri organizantaj asocioj, kongreso ambaŭflanke de la limo), sed ankaŭ sufiĉe granda evento. Bona novaĵo, alveninta en decembro: la fonduso por german-pola kunlaboro konsentis finance subteni la kongreson.

Oficiala malfermo de la kongreso okazos en Eŭropa Universitato Viadrina en Frankfurt (Oder) sabaton, la 30-an de majo antaŭtagmeze. Ĝi estos dediĉita al la kongresa temo „najbaroj“, grava ĝuste en tiu loko. Temos pri la rilatoj inter Pollando kaj Germanio, al kiuj ankaŭ esperantistoj ambaŭflanke de la limo multon kontribuis, kaj aliaj najbaraj rilatoj en la mondo. Por la ceteraj kunvenoj ekde la interkonatiĝo vendredon (29-a de majo) vespere ĝis ĵaŭdo, la 4-a de junio, disponeblas la domo de Collegium Polonicum (komuna fondaĵo de Viadrina kaj Adam-Mickiewicz-Universitato en Poznań) en Słubice. Ne zorgu pri la distancoj: Collegium Polonicum troviĝas tuj dekstre post transpaso de la ponto inter Frankfurt kaj Słubice. Ĉio estas piede atingebla.

Por la kongresa programo jam estas antaŭvidita listo de prelegoj kaj laborgrupoj, kursoj, ekspozicioj kaj vesperaj muzikaĵoj. Ekskursoj dum la komuna parto de la kongreso okazos kiel kutime sabaton kaj dimanĉon posttagmeze: vizito de la urboj Frankfurt/Słubice kun la universitato Viadrina, vizito al Berlino kun la ĉefaj vidindaĵoj en la urbocentro, kaj vizito al la idilia banloko Bad Saarow ĉe la lago Scharmützelsee. En la sekva programo de la fervojista kongreso troviĝas pliaj ekskursoj en la ĉirkaŭaĵon (parte kun faka programo) kaj tuttaga vizito al la arbara regiono Spreewald sude de Berlino. Eblos loĝi en hoteloj kaj pensionoj ambaŭflanke de la rivero, facile troveblaj per la reto. Aparte favorebla estas la loĝado en la komforta studenta hejmo de Collegium Polonicum je piedira distanco de la kongresejo (adreso: ul. Pilsudskiego 14, PL 69-100 Słubice, telefono +48 61 829 6903, <http://dsslubice.amu.edu.pl/>). Tie eblas rekte rezervi en la pola, germana kaj angla lingvoj kun la indiko „Esperanto“. Prezo (sen matenmanĝo) por unulita ĉambro kun propra duŝo/necesejo estas 80 zlotoj, do ĉ. 20 eŭroj, por dulita ĉambro 130 zlotoj, do ĉ. 32,50 eŭroj. En kategorio sen aparta duŝo/necesejo la ĉambroj kostas 70 kaj 90 zlotojn, do 17,50 kaj 22,50 eŭrojn respektive. Manĝoj estas riceveblaj en la sama domo, kiu ankaŭ disponas pri propraj kunvenejoj. Pluraj ĉambroj estas kutime grupigitaj ĉirkaŭ komuna kuirejo, kiun eblas uzi dum la restado.

Bonvolu anticipi indiki, se vi bezonas lifton (ne ĉiuj ĉambroj estas lifte alireblaj). Kiel aliĝi? Plej facile per la reta aliĝilo: gek.aligho@esperanto.de. Aliĝo validas post ricevo de la kongreskotizo: la konton vi trovos en la reto. Por la IFEF-kongreso (kiu daŭros 3 tagojn pli longe kaj kostas iom pli) validas aparta adreso: ifk.aligho@esperanto.de kaj aparta konto. Ĉion plian vi trovos en la dua informilo, kiu aperos paralele al ĉi tiu eldono de *Esperanto aktuel*. Ulrich Brandenburg

Mitgliederversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes am 31. Mai 2020 in Słubice

Liebe Mitglieder,

die nächste Bundesversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes e.V. wird wie beschlossen im Rahmen des Deutsch-Polnischen Esperanto-Kongresses stattfinden, der gemeinsam mit dem Jahreskongress des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten in Frankfurt (Oder) und Słubice ausgerichtet wird. Alle Mitglieder des Deutschen Esperanto-Bundes sind zur Teilnahme herzlich eingeladen. Lt. Para. 7.5 unserer Satzung kann die Bundesversammlung in der Bundesrepublik Deutschland oder einem der Nachbarländer durchgeführt werden. Ort: Tagungsort Collegium Polonicum, ul. T. Kościuszki 1, 69-100 Słubice, Polen

Zeit: Sonntag, den 31. Mai 2020, ab 9:00 Uhr

Vorgeschlagene Tagesordnung

1. Eröffnung
 - a) Begrüßung
 - b) Feststellung der Beschlussfähigkeit
 - c) Genehmigung der Tagesordnung
 - d) Wahl der Protokollführer und des Versammlungsleiters zu TOP 3 und 4 a)
 - e) Genehmigung des Protokolls der Bundesversammlung vom 9. Juni 2019 (siehe Esperanto aktuell 2019/5)
 1. Berichte der Bundesorgane
 - a) Bericht des Vorstandes
 - b) Bericht des Schatzmeisters
 - c) Bericht der Rechnungsprüfer
 1. Entlastung des Vorstandes
 2. Wahl eines von zwei Rechnungsprüfern
 3. Haushaltsplan 2021 (siehe Esperanto aktuell 2020/1)
 4. Behandlung von Anträgen
 5. Ort und Zeit der Bundesversammlung 2021
 6. Verschiedenes

Anträge zur Bundesversammlung bitte ich rechtzeitig bei mir einzureichen. Soweit sie die Satzung, Beiträge oder Auflösung des D.E.B. betreffen, müssen sie mir lt. Satzung 3 Monate vor der Bundesversammlung vorliegen und spätestens 4 Wochen vor der Versammlung zirkuliert werden.

Ich freue mich, Sie im Juni in Frankfurt (Oder) und Słubice begrüßen zu dürfen!

Berlin, den 14. Januar 2020
gez. Ulrich Brandenburg, Bundesvorsitzender

Germana Esperanto-Asocio / Deutscher Esperanto-Bund

D.E.B.-Haushaltsplan 2021

Einnahmen

2109, 2110, 2111, 2112, 2113	Mitgliedsbeiträge	45.000 €	
2420	Förderbeiträge	0 €	
2112	Beiträge von Mitgliedsorganisationen, nur EBLOGO	0 €	
8004	Wareneinnahmen	0 €	
4150	Zinserträge	0 €	
3220	Spenden, allgemeine	0 €	
	Summe		45.000 €

Ausgaben

Geschäftsverkehr

3248	Spenden, Internet	0 €	
	Mitgliederverwaltung	-600 €	
2700	Finanzbuchhaltung	-83 €	
	Internet, Domains, Zertifikate	-700 €	
2559	Personalkosten, Netto	-5.400 €	
2543	soziale Aufwendungen	-1.685 €	
2555	VBG Unfallversicherung	-180 €	
2570, 2572	Reisekosten, allgemein und Katzbachstraße	-300 €	
4712	Nebenkosten des Geldverkehrs	-50 €	
2702	Telefon, Internet-Anschluss	-1.200 €	
	AS-Infodienste (800er-Nr, Telefonkonferenz)		
2753	Versicherungen, Beiträge (Abgaben, Registergericht)	-700 €	
2701	Büromaterial (Briefmarken, Druckertoner, ...)	-600 €	
	Europa Esperanto-Unio	-400 €	
2752	Aligitaj Membroj de UEA	-800 €	
	Sonnenberg-Kreis e. V.	-85 €	
2800	Mitgliederpflege	-100 €	
2894	Rechts- und Beratungskosten	-500 €	
2810	Repräsentationskosten (z. B. Ehrungen, Todesanzeige)	-200 €	
2900	Sonstige Ausgaben	0 €	
	Summe		-13.583 €

Vorstandsarbeit

3248	Spenden für Vorstandsarbeit	2.400 €	
	Budget	0 €	
2571	Reisekosten/Spesen/Unterbringung	-3.000 €	
	Summe		-600 €

Geschäftsstelle Katzbachstraße

3233	Spenden, Katzbachstraße	0 €	
2661	Raumnutzung durch ELB	960 €	
2661	Miete Katzbachstraße	-5.964 €	
2665	Energiekosten (Strom)	-1.300 €	
2662	Nebenkosten, Katzbachstraße (Versicherung)	-300 €	
2664	Einrichtung, Renovierung, Unterhalt	-300 €	
2502	Computer, Maschinen, Programme	-200 €	
2670	Ausgaben, Katzbachstraße, allgemein	-100 €	
	Summe		-7.204 €

Esperanto aktuell

3235	Spenden, Esperanto aktuell	0 €	
8006, 8007	Abonnement, allgemein	468 €	
8006, 8008	Abonnement, DEJ	0 €	
6543	Abonnement, Österreich	600 €	
6901	Redaktion	-2.400 €	
6902	Druckkosten	-4.200 €	
6903	Versandkosten, Post	-4.000 €	
6904	Verpackung und Versand durch CVS	-1.400 €	
	Summe		-10.932 €

Esperanto Unterricht

3241	Spenden, Esperanto-Unterricht	0 €	
6701	Personalkosten, Netto	-5.800 €	
6751	soziale Aufwendungen	-2.400 €	
2924	Förderung, Kurse, Seminare	0 €	
	Summe		-8.200 €

Aussenwirkung, Pressebeauftragter

3240	Spenden, Werbematerial	0 €	
2552	Personalkosten, Netto	-2.400 €	
2820	Werbungskosten (z. B. Messe Werbematerial)	-1.500 €	
	Summe		-3.900 €

Mitgliederwerbung

	Mitgliederwerbung	-1.000 €	
	Summe		-1.000 €

Esperanto Europa-Arbeit

3234	Spende, Europa-Arbeit	36.000 €	
2558	Personalkosten, Netto	-20.000 €	

2544	soziale Aufwendungen	-12.300 €	
6762, 6763	Lohnsteuer + Soli	-3.500 €	
	Summe		200 €

Landesarbeit

3249	Spende, Landesarbeit	0 €	
2920	Landesverbände, Förderung	-2.500 €	
2921, 2931	Ortsgruppen, Förderung	-2.500 €	
2923	sonstige Veranstaltungen	-500 €	
2821	Rundreisen der Referenten	-500 €	
	Summe		-6.000 €

Archivarbeit

3244	Spenden, Archivarbeit	0 €	
2913	Deutsches Esperanto-Archiv	0 €	
	Summe		0 €

Esperanto-Bibliotheken

3242	Spenden, Esperanto-Bibliothek Aalen	0 €	
2910	Subvention, Esperanto-Bibliothek Aalen	-2.000 €	
	Gemeinsamer eOPAC	-60 €	
	Summe		-2.060 €

Esperanto-Zentrum "Marie Hankel"

3243	Spenden, EZMH	0 €	
2911	Ausgaben, Marie-Hankel-Zentrum, allgemein	0 €	
2912	Ausgaben, Marie-Hankel-Zentrum, Miete	-444 €	
	Summe		-444 €

Deutscher Esperanto Kongress

	Summe		0 €
--	--------------	--	------------

PSI – Internationale Frühlingswoche

	Summe		0 €
--	--------------	--	------------

Luminesk

	Summe		0 €
--	--------------	--	------------

Deutsches Esperanto-Institut

	Ein-/Auszahlung		0 €
--	-----------------	--	------------

Sonstiges

3251	Gezahlte Spenden/Zuwendungen	0 €	
------	------------------------------	-----	--



Berlin, 26.01.2020

Al la aktivuloj de Germana Esperanto-Asocio

Karaj geamikoj,

multaj el vi certe jam aŭdis pri kastelo Grésillon, la kulturdomo de la francaj esperantistoj en la urbeto Baugé (Anjou). Kelkaj eble jam partoprenis kursojn aŭ seminariojn tie, aŭ simple pasigis kelkajn feriotagojn en bela ĉirkaŭaĵo. Hodiaŭ mi skribas por atentigi vin pri la printempaj Esperanto-kursoj en Grésillon inter la 17-a kaj la 25-a de aprilo. Planataj estas lingvokursoj je kvar diversaj niveloj (de A1 ĝis C1, do por komencantoj kaj progresintoj). Por la niveloj B1 ĝis C1 je la fino de la kurso ankaŭ eblas trapasi KER-ekzamenon. La instruistoj venas al diversaj landoj. Detalojn pri la kursoj vi trovos en la reto sub <http://gresillon.org/printempas>. La kursoj ankaŭ taŭgas por perfektigo de niaj aktivuloj.

En ĉi tiu jaro Germana Esperanto-Asocio disponas pri monrimedo el la EU-programo Erasmus+ destinitaj por subteni klerigadon de niaj aktivuloj en eŭropa eksterlando. El tiu programo ni povas disponigi stipendiojn, kiuj laŭ fiksa tabelo kovras vojaĝ- kaj restadkostojn plus la respektivajn kotizojn. Restas ankoraŭ limigita kvanto. Por la printempaj kursoj en Grésillon GEA povas disponigi –du– tiajn stipendiojn.

Se vi interesiĝas pri tiu ebleco, bonvolu plejeble baldaŭ kontakti min kaj informiĝi pri la necesaj formalajoj.

Amikajn salutojn

Ulrich Brandenburg

Cetere okazis

2019-09-26: Vernisaĝo „Akvo de la mondo“ en Vieno

Kvar pentristinoj kaj unu vestaĵ-kreintino kreis ekspozicion en Vieno. Iliaj verkoj plejparte rilatas al akvo, kaj tute ne rilatas al lingvo. Ĉar ili devenas de diversaj partoj de la mondo, ili elektis titolon en Esperanto: „akvo de la mondo“. La aŭstriaj esperantistoj subtenis tion kaj ĉeestis dum la solena malfermo.



Unu de la pentristinoj Nada Nadj kaj esperantistoj Leopold Patek, Hans-Michael Maitzen kaj Alfred Heiligenbrunner. Foto: Walter Klag.

2019-12-14: Zamenhoffesto en Vieno

Tagmeze, antaŭ la festo, esperantistoj kolektiĝis antaŭ la Zamenhof-monumento ĉe Karlsplatz. La naskiĝtago de Zamenhof estis honorigita pere de prezentadoj: kontraŭmilita literaturo (Stuppnig), la vivo de Zamenhof (Hable), la vivo de Hildegard de Bingen



(Dodik), Esperantomuzeo (Tuider), Esperanto kiel nemateria kultura heredaĵo (O Riain), kontraŭmilitaj verkoj de KAVA-PECH (Chrdle), Esperanto-rilataj EU-projektoj de E@I (Baláž).

Ĉeestis gastoj el Aŭstrio, Slovakio, Ĉeĥio, Kroatio, Finnlando, Usono, Irlando, Pollando kaj Rusio.

Finiĝis la aranĝo per komuna babilado ĉe bongusta bufedo. Kelkaj poste ĝuis la urbajn kristnask-merkatojn.

Foto (sube maldekstre): esperantistoj antaŭ la Zamenhof-monumento en Vieno.

2019-09-18: Esperantomuzeo Vieno gvidis packomitatanon

En Vieno regule okazas kunvenoj de la packomitato Vieno (NGO Committee on Peace United Nations Vienna). Tio estas organizo de la Unuiĝintaj Nacioj.

Partoprenas diversaj NRO-oj (ne-registaraj organizoj). UEA estas unu de la partoprenantaj organizoj. Ĝi delegis s-ron Hans Michael Maitzen kaj ties anstataŭantojn (Florineth kaj Heiligenbrunner).

Pasintan septembron okazis „rea“ vizito. T.e. la packomitato vizitis la Esperantomuzeon en Vieno.

La teamgvidanto de la Esperantomuzeo, s-ro Bernhard Tuider, persone gvidis la grupon tra la muzeo.

Li klarigis la historion de planlingvoj, rakontis pri Volapük, Esperanto kaj Ido.

Li gvidis tra la kvin „sekcioj“ de la muzeo: LUDO (elektronika surekrana ludo pri bazaĵoj de Esperanto), ARTO (aŭskulteblas ekzemploj de diversaj planlingvoj, inter alie Volapük, Ido, Klingona, Starckdeutsch), NATURO (ĝi montras, ke ankaŭ „naturaj“ lingvoj sekvas lingvan planadon. Ekzemple la germana vorto



„Gas“ estis invento de Johan Baptista van Helmont el la 17-a jarcento.), PRAKTIKO (sur mondmapo videblas Esperanto-rilataj bibliotekoj, muzeoj, ĉi-jaraj aranĝoj).

Ankaŭ la historio de la IEMW mem estas interesa. Ĝi inaŭguriĝis antaŭ 90 jaroj, en la jaro 1929. Dum la nazia tempo la libroj estis savitaj de deportado kaj detruo. Ili estis tenitaj en la kelo de la nacia biblioteko, kontraŭ la intenco de la nazia reĝimo. Kelkaj tiamaj kunlaborantoj de la muzeo suferegis sub ĝi. Du el ili estis deportitaj al koncentrejoj kaj mortigitaj.

En la 1920-aj kaj 1930-aj jaroj kelkaj firmaoj uzis Esperanton kaj Idon por varbi. La muzeo montras diversajn varbilojn.

Libroj kaj leteroj memorigas pri la fruaj parolantoj kaj subtenantoj (Hodler, Bertha von Suttner k.a.).

En la leg-salono eblas legi librojn el la Kolekto por Planlingvoj. Krom Esperanto troveblas tie informoj pri pli ol 500 planlingvoj. (La muzeo ja estas parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko.)

Je la fino de la plurhora prezentado, s-ro Tuider gvidis lecionon pri Esperanto por komencantoj.

Gvidoj tra la muzeo kaj fulmkursoj okazas laŭ ebleco. Rekomendinda estas sufiĉe frua anonco ĉe kulturvermittlung@onb.ac.at aŭ telefone ĉe +43-1-53410-464. Prezojn bonvolu eldendi tie.

La foto montras de dekstre: s-ron Maitzen, s-ron Tuider (teamgvidanto de la Esperantomuzeo), sep membrojn de la packomitato. Meze, malalte: s-ro Heiligenbrunner. Ĝi estis farita ene de la Esperantomuzeo.

Foto: el la mobiltelefono de Alfred Heiligenbrunner.

90 jaroj de Esperantomuzeo de Aŭstria Nacia Biblioteko kaj internacia scienca simpozio pri planlingvoj kaj lingvoplanado

Laŭ ideo de Felikso Zamenhof (1868-1933) pri internacia Esperantomuzeo la aŭstro Hugo Steiner (1878-1969) transprenis tiun impulson, fondante la muzeon en la aŭstria ĉefurbo.

La 1-an de aŭgusto 1929 akceptis tiun Internacian Esperanto-Muzeon la Aŭstria Nacia Biblioteko (ANB) kiel „corpus separatum“ (specialigita kolekto) per solena inaŭguro en sian sinon.

Ĉar dum la lastaj jaroj la evoluo de tiu muzeo laŭkvante kaj laŭkvalite tre bone progresis (jara rekordo de 20 mil vizitantoj, inter alie), la estraro de ANB sekvis la atentigon pri la 90-jara jubileo en 2019 kaj decidis okazigi internacian sciencan simpozion, konkorde kun la propono de Esperantomuzeo, pri planlingvoj kaj lingvo-planado.

La simpozio estis dutaga kaj estis inaŭgurita solene, matene la 24-an de oktobro 2019, en la palaco Mollard, sidejo de Esperantomuzeo.

Partoprenis kaj ĉeestis kvindekda lingvistoj el 15 landoj kaj ankaŭ gastoj. Nur parto estis esperantistoj. La estraro de ANB tial venis al la decido pri uzo de la angla por la prelegoj. Esperanto tamen ĉeestis inter la oficialaj programeroj kaj tiel servis kiel spertiga informfonto pri la funkciado viva de la plej signifa planlingvo. Samtempe tiu lingva reguligo en la simpozio liveris impresan informon pri la kvalito-gamo de la diversspeca uzado de la angla lingvo.

La jubileo de Esperantomuzeo instigis retrorigardi al ĝia epizodrica historio, observi la aktualajn projek-

tojn kaj okupiĝi pri la esplorkampoj de lingvo-muzeoj, planlingvoj kaj lingvo-planado.

La unua tago (24-a de okt.) estis la „ĝenerala“ pri ĉiuj planlingvoj. Al la kvar temgrupoj (muzeoj, planlingvoj, lingvo-planado, biografioj) kontribuis de la Esperanta deveno la konataj lingvistoj Sabine Fiedler, Klaus Schubert kaj Michael Gordin.

La dua (25-a de okt.) estis la „Esperanto-tag“ kun la temaro „origino“, „biografio“, „esplorprojektoj“ kaj „lingvo kaj tutmondiĝo en la 21-a jarcento“, kie inter alie prelegis la verdaj eminentuloj Humphrey Tonkin, Federico Gobbo kaj Sean O'Riain.

La opinioj pri la simpozio estis tre pozitivaj, tiel ke oni eĉ sugestis estontan simpanion en Esperantomuzeo. Informemo ekzistis ankaŭ pri publikigo de la prelegoj.

Programo kaj resumoj haveblas.

Resume oni povas nur forte akcenti la meritojn de la aranĝo, kiuj ekzistis pro ties eksperimenta karaktero. Estas ja kvazaŭ nun devo analizi detale, kie oni povus atingi ankoraŭ plialtigon de la kvalito. Ankaŭ rilate la lingvan solvon konsiderindas modifoj. Enhave pripensindas la rilato de Esperanto al la latina lingvo.

Finfine necesegas granda danko kaj gratulo kun plena respekto al la teamestro de Esperantomuzeo mag. Bernhard Tuider kaj liaj kunlaborantoj, pro ilia projektado, preparado kaj realigado de tiu unika simpozio jubilea, omaĝe al la vivoverko de d-ro Zamenhof, kiu naskiĝis 70 jarojn antaŭ la inaŭguro de Viena Esperantomuzeo!

Hans Michael Maitzen



Kolonja Esperanto-Grupo festis Antaŭkristnaskan kaj Zamenhof-Vesperon en Bensberg

Komence de decembro Kolonja Esperanto-Klubo, gvidata de Harald Schmitz, renkontiĝis en pitoreska kafejo en Bensberg apud Kolonjo.


Ekde pli ol dek jaroj tio jam tradicie okazas. Ĉi-foje venis preskaŭ dudek parolantoj de Esperanto, interalie geamikoj el Bonn kaj du el Italujo, por ĝui memfaritajn dolĉajn kaj spicajn frandaĵojn.

Harald, specialisto por bongusta spicvino, kun aŭ sen alkoholo, kunportis la bonodorajn trinkaĵojn.

Ĉiuj ĝuis la etoson, rakontis, gustumis kaj trinkis en hejmeca rondo.

Kantante kristnaskajn kaj aliajn kantojn, ankaŭ kelkajn en la kolonia idiomato, la ĉeestantoj bedaŭris, ke la vespero finiĝis ankaŭ ĉi-jare pli rapide ol ĉiuj deziris.

HK



Erfahrungen der Esperanto Gruppe Duisburg

Das neue Konzept der Esperanto Gruppe Duisburg ist „Esperanto- unu lingvo en unu monato“, zwei Wochenendintensivkurse in denen alle Grundlagen der Sprache Esperanto erlernt und angewandt werden können.

Die Esperanto Gruppe Duisburg bietet schon seit einigen Jahren regelmäßig Intensivkurse an, meist für Anfänger, aber auch für Fortgeschrittene.

Nach kurzer Zeit wurde auf dem Sprachcafé in Düsseldorf erzählt, dass die Esperanto Gruppe Duisburg sehr aktiv und Menschen wurden so zu uns empfohlen. Dennoch war es interessant, dass die meisten Kursteilnehmer nicht einmal aus Duisburg oder Umgebung kamen, sondern häufig aus weit entfernten Städten, wie Tübingen oder Leipzig. Das verwundert schon ein wenig und ruft nach verbesserter Präsenz der Ortsgruppen und Kurse im Internet. Vielleicht sollte eine Initiative des Deutschen Esperanto Bundes ausgehen und den einzelnen Ortsgruppen Hilfestellung und eventuell auch geldliche Unterstützung anbieten. Immerhin können wir nur neue Mitglieder gewinnen, wenn auch neue Menschen Esperanto erlernen und erleben.

Um das Anbieten von Kursen und anderen Esperanto-Aktivitäten zu vereinfachen hat REVELO bereits letztes Jahr eine Unterstützungszahlung für aktive Ortsgruppen beschlossen. Diese hilft ungemein, da das Drucken von Flyern oder Postern und die Werbung doch Geld kosten, was eine kleine Gruppe, oder einzelne Person nicht dauerhaft alleine stemmen kann. Sie wird als Aufwandsentschädigung ausgezahlt nach dem Ereignis.

Schön wäre es natürlich, wenn der DEB auch solche Maßnahmen beschließen könnte, z.B. Unterstützung zu Kursen, oder günstigere Schnuppermitgliedschaften für ein Jahr oder so.

Im neuen Jahr jedenfalls wird es in Duisburg folgende Kurse geben:

- 15.-17. Januar (Anfänger)
- 14.-16. Februar (Weiterführend)
- 24.-26. April (Anfänger)
- 30.April-3.Mai / PEKO (Anfänger)
- (21.)22.-24. Mai (Weiterführend)
- 21.-23. August (Anfänger)
- 11.-13 September (Weiterführend)
- 2.-4. Oktober / KoKoLoRes (Weiterführend)
- 13.-15. November Jokerkurs

Zu erkennen ist, dass es drei Kurspaare geben wird, die es ermöglichen Esperanto innerhalb eines Monats zu erlernen. Menschen, die gleich beide Kurse buchen erhalten einen Rabatt auf die Kursgebühr.

Eine Sprache lernen in nur einem Monat!

Das ist das neue Konzept der Lehrreihen „Esperanto- unu lingvo en unu monato“, zwei Wochenendintensivkurse in denen alle Grundlagen der Sprache Esperanto erlernt und angewandt werden können.

Die Grundlage unserer Kurspaare in Duisburg ist das Lehrbuch „Tesi, la testudo“. Der Einsteigerkurs erfordert keine Esperanto-Vorkenntnisse. Wir beginnen am Freitagabend mit einer Vorstellungsrunde, in der wir uns über Wünsche und Erwartungen an den Kurs austauschen. Dann erarbeiten wir die Grundlagen, die Aussprache- und Betonungsregeln, die wir auch gleich einüben. Je nach verbleibender Zeit sehen wir in die erste Lektion, die wir am zweiten Tag wiederholen und weiter im Buch fortschreiten.

Der Folgekurs setzt die Kenntnis der ersten drei Lektionen voraus und beginnt mit einer Wiederholung der dritten Lektion, bis zum Kursende schaffen wir die fünfte Lektion.

Die Kurse werden von qualifizierten Esperantolehrern geleitet. Die Kursgebühr beträgt 60 € einschließlich Lehrbuch, ermäßigt 40 €. Wer das Lehrbuch „Tesi, la testudo“ mitbringt, bekommt entsprechend Rabatt auf die Kursgebühr.

Der Rabatt für das Anmelden zu einem Kurspaar beträgt zusätzlich 10 €.

Dabei wird es möglich sein, den zweiten Kurs auch etwas zu schieben, wenn es zeitlich besser passt. Der Novemberkurs wird ein Jokerkurs für Fortgeschrittene, wobei es darum gehen wird, offene Fragen der Teilnehmer gemeinsam zu bearbeiten und zu beantworten.

Interessiert? Einfach an christine.duisburg@gmx.de schreiben.

Christine Brücker

Zamenhoffesto 2019 en Berlino

Berlinaj kaj brandenburgiaj esperantistoj ankaŭ en la jaro 2019 invitis al Zamenhoffesto en Oranĝerion, la civitanan renkontiĝejon de la distrikto Lichtenberg en Berlino. Jam temas pri fiksa adreso de niaj aranĝoj.

Ĉi-foje ni celebris la datrevenon de la naskiĝtago de L.L. Zamenhof kaj la Tagon de la Esperanto-libro la 14-an de decembro.

Al la Zamenhoffesto venis ĉirkaŭ 60 personoj. Denove venis polaj geamikoj el Szczecin kaj Zielona Góra, sed ankaŭ el la regiono de Lublin kaj Silezio, el Moskvo – kaj eĉ el la fora Brazilo venis 4 homoj. Memkompreneble niaj „eksteraj“

gastoj estis petataj saluti la ĉeestantojn. Krome menciindas la ĉeesto de amikoj de la planlingvo Ido.

Okaze de la tradicia festprelego Ralf Fröhlich ricevis la bonŝancon prezenti sian unikan projekton en iama stacidomo de la vilaĝo Halbe. Ĝia nomo estas „Esperanto-stacio“. Tie jam okazis pluraj aranĝoj kaj kursoj, kaj laboremuoj povis renovigi la konstruaĵon, kiu cetere havas interesan najbaron, nome unu el la tielnomataj „Imperiestraj Stacidomoj“. Ekzistas fruktodona kunlaboro, kiel mi jam mem spertis.

Ankaŭ okazis pluraj interesaj prezentaĵoj de en- kaj eksterlandaj amikoj. Parte la petoj de ili venis lastmomente kaj iomete estis malfacila tasko por doni tiujn al la programo, ĉar unuafoje nia aranĝo nur okazis inter la 15-a kaj la 19-a horoj (minimume laŭ plano).

Fritz Wollenberg prezentis la ekspozicion pri la 10-jariĝo de Zamenhofparko, kiu ankaŭ situas en la urba distrikto Lichtenberg de Berlino. Estis la lasta tago de tiu tre interesa ekspozicio en la konstruaĵo Orangerio. Pro tio s-ro Wollenberg invitis al gvidado.

Aleksandro Zdechlik, kiu ĝis majo 2019 estis la prezidanto de Pola Esperanto-Asocio, prezentis impresoriĉajn bildojn kaj tekstojn pri la biografio de Zamenhof kaj krom tio pri germanoj kaj ties rilatoj al Bjalistoko.

Philipp Sonntag prezentis memfaritan poemon pri bestoprotektado kaj en Esperanto kaj en la germana lingvoj.

Ronald Schindler invitis al la pola-germana-fervojiŝta Esperanto-Kongreso, kiu okazos dum Pentekosto 2020 kaj la sekvonta semajno en la „Duobla urbo“ Frankfurt ĉe Odro kaj Slubice. La ĉeestantoj ricevis informojn pri la historio, la kongresejoj kaj pri tranokteblecoj.

Planitaj estis skajp-konferencoj kun Parizo, Vieno kaj aliaj grupoj, kiuj samtage festis Zamenhofon. Pro parte politikaj kaj teknikaj problemoj ni ne sukcesis realigi tion.

Ne mankis speciala koncerteto. Ĉi-jare ni sukcesis inviti triopon, kiu hazarde konsistis el Birke Dockhorn, Bertilo Wennergren kaj kiel surpriza gasto Alena Adler el Usono. Tre altkvalite ili prezentis originajn kaj tradukitajn kantojn, parte el mondkonataj muzikteatraĵoj.

Niaj junaj brazilaj gastoj el Rio de Janeiro kaptis la bonŝancon prezenti la Esperanto-movadon en Brazilo kaj invitis al diversaj altinteresaj aranĝoj en tiu grandega lando.

Alia muzika programo sekvis de Halina el Szczecin, kiu instigis la partoprenantojn al kantado en Esperanto kaj pola lingvo. Nur por tiu programero ŝi pertrajne kunportis tre pezan akordeonon.

Dum la tuta aranĝo okazis la jam tradicia kafumado, la unika libroservo de Johano Pachter kaj la jam menciita ekspozicio pri Zamenhofparko.

Multan dankon al ĉiuj kunagintoj kaj helpintoj por ornamo la salonon.

La sekvontan Zamenhoffeston ni jam fiksas en la sama salono por la 19-a de decembro 2020. Do jam notu la daton por certigi vian partoprenon!

Ronald

Ronald Schindler, Frankfurt (Oder)

Zamenhof-Fest der Esperanto-Gruppe Bamberg

Samstag, 7. Dezember 2019

111 Jahre und aktueller denn je

„Meine Vatersprache ist Esperanto,“ sagte der aus Berlin angereiste Botschafter a.D. Ulrich Brandenburg, Bundesvorsitzender des Deutschen Esperanto-Bundes e.V.

"Mein Bruder und ich mussten unseren Mitschülern und Freunden erst erklären, dass es völlig normal ist, Esperanto zu sprechen.“

Er lobte besonders die Deutsche Esperanto-Jugend, die seit den 1950er Jahren sehr viele Jugendliche für diese Sprache begeistern konnte. „Durch die hochwertigen internationalen Veranstaltungen wurde auch vom Bundesjugendministerium unsere Sprache bei der Vergabe von Mitteln für die internationale Jugendarbeit gefördert.“ Sogar Ehen wurden gestiftet. Er begrüßte Dieter und Yoshi Kleemann, die sich auf einem Esperanto-Treffen in Japan kennengelernt hatten und jetzt anwesend waren.

Aus ganz Bayern trafen sich Esperantisten in Bamberg auf dem Michaelsberg, um das 111jährige Jubiläum feierlich zu begehen. Der Rundblick von dort über die historische Stadt wurde von dem Romanisten Prof. Dr. Martin Haase, Universität Bamberg, beeindruckend kommentiert.

